

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4 Aprilo, 2014


Kara Leganto, oni povus diri, ke sur paĝoj de nia bulteno jam aperis iu “ukraineca” tradicio (pro la numeroj 01-03.14), sed ankaŭ ĉi n-ro estas dediĉata al Ukrainio. Tiaj estas realaĵoj de nia vivo. Pacaj protestoj en la ukraina ĉefurbo transformiĝis en moskovian agresion kontraŭ sendependa Ukrainio, kio rezultigis en aneksio de Krimea duoninsulo. Pri kiu amikeco inter “frataj” popoloj oni nun rajtas diri?

La lasta kunveno de nia E-societo pasis sub la signo de la 200-a datreveno de la plej fama ukraina poeto Taraso Ŝevĉenko. Partoprenintoj havis eblecon aŭskulti liajn poemojn ne nur en E-o, sed ankaŭ en la ukraina originalo kaj tradukitaj pole, angle, hispane; rigardi plenumadon de kantoj je la vortoj de Taraso. Ankaŭ ukraina Google la 9-10 de Marto estis ornamita per imago de verkanta Kobzisto. Sendube, la malsupra artikolo ne povas transdoni al vi etoson de nia kunsido, sed vi, almenaŭ, imagu... Dankon! –La Redakcio

Taras' Ŝevĉenko (1814-1861) de Araneo

Lia sola poezia libro nomiĝas “Kobzisto”. Ĝuste tiel nomas sian filon, Taras' Ŝevĉenko-n, la ukraina popolo. Kobzistoj estis plej parte blindaj bardoj, migrantaj dum jarcentoj tra Ukrainio. Per siaj kantoj kaj dums, plenumantaj en la akompano de kordpinĉa muzikilo “kobzo”, ili vekadis nacian konscion de la popolo, alvokadis ĝin al la batalo por libero, por pli bona vivo. Ili ne havis familion, des pli – havaĵon, la ununura ilia riĉo estis kanto – pasia, kuraĝa, kortuŝa, senmorta.

Kun la nomo de Taraso kaj liaj poeziaĵoj ligiĝas la naskiĝo de nova ukraina literaturo kaj renesanco de la ukraina nacio. La vorto de la poeto estis por la popolo apogo dum plej malfacilaj periodoj; la “Kobzisto” iĝis kvazaŭ nacia Biblio de ukrainoj, kaj Taraso mem estiĝis popola profeto. Lia mallonga vivo estis sternita per dornoj. Taraso naskiĝis en 1814 en la familio de servutulo kaj mem estis tiu ĝis la 24-a jaro de sia vivo. Nur naŭ jarojn Ŝevĉenko vivis per plenalora vivo: studis en Artakademio, verkis, pentris, laboris en arkeologia komisiono. En 1840 aperis la poemaro “Kobzisto”. Ŝevĉenko aktive partoprenis agadon de la fratara societo “Kirilo kaj Metodio”, estante ĝia spirita gvidanto. La societo celis neniigon de aŭtokratio, abolicion de servuto, fondon de la tutslava federacio kun disponigo de egalaj rajtoj kaj vasta



politika aŭtonomio por ĉiu popolo. En 1847 Ŝevĉenko kiel ano de la frataro estis arestita. Dum la aresto ĉe li estis trovitaj poemoj kun forte esprimitaj kontraŭ-caraj kaj kontraŭ-aŭtokratiaj motivoj. Jen kiel satire poeto prezentas proponon de amikeco fare de “grand-rusa frato” al aliaj popoloj, okupitaj de Moskovo (fragmento el la poemo “Kaŭkazo”, trad. K. Long):

Kaj se kun ni vi amikiĝus,
vi lernus ion-tion, multon.
Ni havas tiacele spacon:
netraireblan Siberion–karcerojn!
homojn! Kiel nombri?
De finno ĝis moldavo, ĉiuj
en ĉiuj lingvoj silentadas –
ĉar fartas bone! Legas Sanktan
Biblion kaj instruas sankta
Monah': ke iu caro paŝtis
ŝafaron, prenis de l' amiko

l' edzinon, kaj l' amikon murdis–
kaj estas surĉiele nun.

Rigardu kiel niaj homoj
ĉieleniras! Vi malkleras
sen ilumin' el Sankta Kruc',
sed ni instruos pri rabado:

Rabu dise
Paradizen!

eĉ kune kun la famili'!

Tio kaŭzis lian soldatigon kaj ekzilon kun severa malpermeso verki kaj pentri. Dek longajn jarojn suferis Ŝevĉenko. La ekzilo ruinigis lin fizike, sed ne spirite. Malgraŭ severaj kondiĉoj la poeto scipovis eltrovi eblecon por verki poeziaĵojn, enskribante ilin en malgrandajn kajeretojn, kaŝatajn malantaŭ bottubo. Nome tie li verkis poemon, kiu ĝis nun estas la plej populara inter tutmonda ukraina diasporo (trad. M. Bronŝtejn):

Por mi egalas, ĉu mi restos
Aŭ foros de l' Ukraini'.
Ĉu oni tute min forgesos
Trans la fremduja neĝlini' –
Egalas tute do por mi.
Kreskinta en ekzilo fremda,
Mi, sen funebra plor' parenca
Forpasos en la malliber',
Kunprenos ĉion for de l' ter',
Eĉ etan spuron ne lasinta
En lando glora ukraina,
En nia – ne en mia ter'.
Kaj patro dum funebro mia
Ne petos filon: “Preĝu, fil',
Por li, pro land' Ukrainio”



Ekzekutita en ekzil”.

Por mi egalas absolute,
Ĉu l’ filo preĝos poste pli,
Sed ne egalas ja por mi,
Se trompular’ dormigos tute
Ukrajnon, kaj en fajra bril’
Ĝin, priŝtelitan, vekos krude...
Oh, ne egalas ja por mi.

Ŝevĉenko mortis en 1861 en Peterburgo kaj estis tie enterigita. Sed jam en 1862 liaj restaĵoj estis transportitaj Ukrainion (urbo Kaniv) kaj enterigitaj sur la monto, de kie vidiĝas majesta Dnipro kun belaj ĉirkaŭaĵoj. Tiel estis plenumita la volo de la poeto, esprimita en lia “Testamento” (trad. N. Andrianova-Hordijenko):

Post la mort’ min enterigu
en patrujo kara,
meze de la stepo vasta
sur tumul’ miljara.
Tiam Dnipro krutabordan,
la kampojn fekundajn
povus vidi mi kaj aŭdi
ondojn dum inundoj.

Taras’ Ŝevĉenko verkis ankaŭ proze en la rusa lingvo, teatraĵojn. Li estis fama pentristo (oni aljuĝis al li titolon de akademiano pri gravurado). Ŝevĉenko estis poeto profunde nacia, la fonto de lia poezio estis la vivo de la popolo kun ĝiaj suferoj kaj ĝojoj, riĉa nacia historio. Lingvaĵo de liaj poemoj ravas per sia simpleco kaj melodieco. Kobzisto heredigis al ni la solan riĉaĵon – siajn poemojn, multaj el kiuj iĝis polaj kantoj, kiel enkonduko al poemo “Frenezulino” (trad. S. Vajnblat):

Bruegas, ĝemas Dnipro vasta
Kaj muĝas la kolera vent’,
Fleksiĝas la salik’ elasta,
Leviĝas ond’ ĝis firmament’.
Kaj pala luno ne kuraĝis
Elveni tuta el nubar’,
Jen dronis ĝi, jen ĝi elnaĝis
Simile al boat’ en mar’
Ne kantis dume fruaj kokoj,




Silentis ĉio ĝis maten’.

Aŭdiĝis nur noktuaj voko
Kaj laŭte knaris la fraksen’.

Dum la lastaj eventoj sur la Majdano (Placo de Sendependeco en la ukraina ĉefurbo Kijivo) oni ofte kaj vaste uzis la imagon de la ukraina profeto (komparu realan foton kun bildo).

Kelkaj vortoj pri Kobzisto kaj IL. La plej unuaj tri esperantigoj de Tarasaj poemoj aperis en la “Lingvo Internacia” (Upsala, Svedio, 1900), ilin aŭtoris rusia E-istino Sofia Sviridova (dum pli ol jarcento pro la subskribo S. Sviridov oni konsideris, ke la tradukisto estis viro. V. Pajuk, post multjara laboro en La Brita Biblioteko pruvis la malon). En 1989 estis eldonita libro de Kobzisto “Testamento en diversaj lingvoj de la mondo” (en pli ol 140 lingvoj). Dum ĝia preparado Esperanto servis kiel pontlingvo inter ukraina originalo kaj: malta, irlanda, kimra, skotgaela lingvoj. La unua E-Kobzisto aperis en Ĥarkivo, Ukrainio (1990), nun estas preta la dua, plivastigita eldono de la Ŝevĉenka esperantigita verkaro (ne nur poemoj).



Piednoto

La ŝikaga komitato “Ĝemel-urboj Internacia” pro la agresio en Ukrainio portempe ĉesis kontaktoj kun Moskvo Ankaŭ nia redakcio ne plu sendos numeroj de ĉi bulteno al la moskva E-grupo.

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

22an de Aprilo – Elpaŝos Gregoro Dolgin: “Rilate al tradukado”:
Cobbler Square, 1350 N. Wells St.
Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn kaj trinkaĵon (dolĉakvon, bieron, vinon, vodkon, viskion).

27an de Majo – temo estos anoncata:
Cobbler Square, 1350 N. Wells St.

22an de Junio – Tradicia E-pikniko